

Johann Wolfgang von Goethe,  
Al la forulino

*tradukita de Lorenz Urbano*

Ĉu perdis mi vin, belulino?  
Ĉu via fuĝo — mia sort' ?  
Ankoraŭ sonas laŭ rutino  
En la oreloj ĉiu vort'.

Kaj kiel al ĉiel' matene  
Rigardas vane la migrant',  
Se alte tra l' aer' serene  
Eksonas la alaŭda kant':

Mi same ĉien en la landoj  
Rigardas ofte kun pasi';  
Vin vokas ĉiuj miaj kantoj:  
Revenu, amatin', al mi!

*Traduko de la Germana poemo "An die Entfernte" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de LORENZ URBANO (civila nomo: Heinrich Lorenz, \*1902 - †1980).*

*MR-518-1a / Arg-845-1703 (2013-02-27 10:35:38)*

*Pri la tradukinto vidu la retejon . Lia civila nomo estis "Heinrich Lorenz", li vivis de 1902 ĝis 1980.*